20-a GEFA-jarkunveno

# PILO-PRESS

Internacia Informservo

Paderborn atendas vin!

Legu sur p. 3!

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69



N-ro 35/76 - 30 aŭg 1976
Aperas ĉiusemajne

## Diskutado kun politikistoj

Offenbach (pp/roko) - La podia diskutado, aranĝita la 26-an de aŭgusto en la Popolaltlernejo de Offenbach, estis bona sukceso, opinias la aranĝinto, Esperanto-Informo Offenbach.

Ĉirkaŭ 60 interesuloj, de kiuj nur la duona parto estis esperantistoj, ĉeestis por debati kun reprezentantoj de kvar partioj. La multnombra partoprenantaro vere influis la politikistojn, kaj la engaĝita kundiskutado de ne-esperantistoj ne nur vigligis la diskuton sed samtempe donis novajn impulsojn al la esperantistaro de Offenbach.

La aranĝo trovis tiom bonan resonancon, ke la ofenbaĥanoj kuraĝigas aliajn Esperanto-grupojn en Germanio kaj memkompreneble ankaŭ en eksterlando, organizi similajn publikajn diskutojn.

Eĉ la paroloj de homoj kiuj kredis konstraŭstari Esperanton pruviĝis esti envere subteno al nia agado. La estro de la popolaltlernejo, s-ro Rolf Ringwald, kiu ĝisnun ĉiam gardis iomete kritikeman pozicion koncerne al Esperanto, ekscitiĝis kaj eksplodis: La esperantistoj devas forlasi sian eburan turon kaj partopreni pli aktive en la publika vivo. Certe Esperanto ne enkondukos la pacon kaj Esperanto estas nur eta paŝo en la direkto al plibonigo de la politika konscio de la F R - Germanoj, sed ĝi ja estas paŝo en la ĝusta direkto." Post la kunveno li proponis mem aranĝi ekspozicion pri Esperanto en la enirejo de la popolaltlernejo.

La 1-an de septembro komenciĝu en la popolaltlernejo Esperanto-kurso.

Esperantistoj el Darmstadt kaj Offenbach nun planas kune pridiskuti la rezultojn kaj spertojn de la podiaj diskutoj kaj prilabori katalogon de proponoj por estontaj diskutoj de tia speco.

## Vatikana gazeto eble en Esperanto

Romo (pp/ra-ro) - Ekzistas projekto aperigi semajnan eldonon de la konata ĵurnalo "L'Osservatore Romano" en Esperanto, ekde venonta jaro, se oni sukcesos varbi almenaŭ 500 abonantojn.

Temas pri sufiĉe vasta projekto, unue pro la prestiĝa nivelo de la gazeto kaj precipe de la eldonanto (Vatikano mem) , due pro la pezaj devontigoj de la eventulaj prizorgontoj de la Esperanto-eldono, kiuj devus certigi ĉiusemajnan tradukadon de fakaj tekstoj, ne nur pri religio, sed ankaŭ pri sociaj temoj.

Ni ne scias, kiu prizorgus la novan eldonon, sed ni povas tion konjekti el la fakto, ke nuntempe oni klopodas plifortigi la Katolikan Esperanto-Centron en Romo per la ĉeesto de alilandaj esperantistaj pastroj, unuavice de la nova prezidanto de IKUE, la polo Ĉeslao Biedulski.

Interesitoj je la iniciato povas anonciĝi ĉe la Centro de IKUE, via Berni 9, I-00185 Roma, Italio. (Laŭ Radio Roma)

## Velado al Rejkjaviko.

Varsovio (pp) - 46 esperantistoj el Pollando havos la eblecon naĝi per velŝipo, la skolta flagŝipo, venontjare al Esperanto-Kongreso en Rejkjaviko. Tiel raportis Pola Radio!

## Laborkonferenco pri Interlingvistiko

Paderborn (pp) - La FEoLL-Instituto pri Kibernetika Pedagogiko okazigos kunlabore kun la GPI-laborgrupo pri interlingvistiko kaj lingvokibernetiko (estro Hermann Behrmann) laborkonferencon rilate demandojn pri interlingvistiko sub speciala konsidero de ĝiaj roloj en pedagogio, lingvo-kibernetiko kaj internacia scienca komunikado.

La konferenco okazos de la 24-a ĝis la 28-a de novembro en la Esplorcentro de Paderborn, Rathenaustr. 69/71, D-4790 Paderborn. Oni invitis aron da esperantistaj kaj ne-esperantistaj fakuloj, i.a. Tonkin, Minnaja, Szerdahelyi, Mangold, Janton, Blanke, Jarmark.

Interesuloj povas ricevi la detalan konferenc-programon ĉe Europa-Klubo, Riemekestr. 62, D-4790 Paderborn.

Samtempe kun la konferenco okazos la jarĉefkunveno de la Europa-Klubo kaj libro-ekspozicio en la Esperanto-Centro de Paderborn.

## Romolo-Kunveno

Frankfurt/M -(pp)- Sabaton, la 2-an de oktobro 1976, okazos la ĉefkunveno de Rhein-Main-Ligo Esperantista (ROMOLO). Kiel pasintjare la ligo eluzas la okazon renkontiĝi komune kun la TANEF-membroj, kiuj aranĝos heslandan kaj tutfederacian kunvenon de vendredo ĝis dimanĉo, de la 1-a ĝis la 3-a de oktobro.

Kunvenejo estas la naturamika domo 6110 Dieburg, kiu situas "Am Mainzer Berg" inter Darmstadt kaj Dieburg.

Krom la ĉefkunveno de la ligo, kiu komenciĝos je la 9,45 horo, la programo antaŭvidas ankaŭ prelegon pri la famkonata fosejo Messel kaj ĝiaj pratempaj fosilioj (kun diapozitivoj), sonfilmon pri la Universala Esperanto-Kongreso en Ateno kaj la surŝipa postkongreso, faritan de W. Barnickel. Pro tranoktoj kaj manĝoj oni sin anoncu ĉe Eki Woite, Kirchstr. 33, 6116 Münster (Tel. 06071/33568).

## Ekspozicio kaj kunveno en Munkeno

Munkeno (pp) - Esperanto-Klubo kaj Fervojista Esperantogrupo München organizos de la 9-a ĝis la 11-a de oktobro 1976 Esperanto-ekspozicion en "Ausstellungsraum", Holzkirchner Bahnhof, Bayerstr. 14. La ekspozicio estos malfermata de 9-a ĝis 18-a horo.

Lunde, la 11-an de oktobro, je la 18,30 horo, okazos informparolado, lumbildparolado kaj provleciono.

## Novaĵoj el la "Esperanto-ranĉo"

Mannheim (pp) - Reporteroj de la radiostacioj "Südwest-Funk" kaj "Süddeutscher Rundfunk" intervjuis la esperantiston Erhard W. Matthes en Mannheim antaŭ kelka tempo pri lia por-Esperanta laboro. Kiel konate, la hejmo de Erh. W. Matthes nomiĝas "Esperanto-ranĉo".

S-ro Matthes lasttempe ankaŭ gajnis premion por sia kolekto de Esperanto-korespondaĵoj en ekspozicio de hobiistoj, aranĝita de la gazeto Mannheimer Morgen, kiu pri tio ankaŭ raportis.

## Novaĵoj el Francio

Croix (pp/lgtx) - En Roubaix malfermiĝis "Domo de l' paco", kie inter multaj aktivaĵoj ankaŭ okazas Esperanto-kurso kaj diverstemaj ekspozicioj. - La nordfrancaj ĵurnaloj "La Voix du Nord", "Nord Eclair" kaj "Nord Matin" aperigis entute 4 artikolojn pri la Universala Esperanto-Kongreso en Ateno.

Paderborn atendas vin

De la 15-a ĝis la 17-a de oktobro 1976 okazos en Paderborn, la urbo kun la multaj "fenomenoj", la 20-a jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA). Ankaŭ ne-fervojistoj estas kore invitataj! Ne hezitu kaj pasigu kelkajn tagojn en esperantista rondo. Partoprenu la ekskurson, la festvesperon kaj dancon kaj la matineon aŭ, se vi volas, en lingva ekzameno.

La prezo por hotelĉambro estas ĉ. 20 GM po lito. Mendu vian ĉambron ĉe S-ino R.T. Lawerino, Ludwigstr. 48, D-4790 Paderborn, tel. (05251) 26456.

Paderborn valoras vojaĝon - ankaŭ en aŭtuno!

El la pola studenta movado

Poznan (pp/sm) - La polaj gestudentoj el Poznano, Stanisław Mach kaj Hanna Lasik, jam dufoje petveturis el Pollando, tra Slovakio, Hungario, Rumanio al Bulgario surbaze de Esperanto, tio estas per uzado de Pasporta Servo, vizito de Esperanto-aranĝoj kaj kluboj.

En Pola Socia Komitato de Aŭtostopo, tre populara asocio por petveturantoj, Stanisław Kulski el Varsovio, nome de Pola Studenta Esperanto-Movado SAPS okupiĝas pri enkonduko de Esperanto por eksterlandaj vojaĝoj de junularo fare de aŭtostopo.

Jam tri jarojn, Pola Studenta Esperanto-Movado organizas tendarojn por studentoj, kiuj volas lerni la Internacian Lingvon. Ĉi-jare la aranĝojn partoprenis 400 personoj. La tutpollanda studenta Esperanto-aranĝo okazis en montara vilaĝo Zieleniec. Esperanto-kursojn gvidis invititaj eksterlandanoj. Dum la tendaro estis gvidataj organiza instruado kaj fervoraj diskutoj pri la praktika uzado de la lingvo.

Olimpika broŝuro nun haveblas

La jam anoncita olimpika broŝuro "Esperanto, internacia lingvo de amikeco," sporta frazaro kaj vortaro, eldonita de Kanada Esperanto-Asocio okaze de la Olimpikaj Ludoj 1976 en Montrealo, nun estas havebla. Prezo 6,20 GM. Mendu'ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Pĉk. Nürnberg 819 56-851.

"Reformisto" pri Esperanto

Rio de Janeiro (pp) - La numero de julio 1976-a de la spiritisma monata revuo "Reformador" (Reformisto), aperanta en Rio de Janeiro, Brazilo, aperigis en la frontpaĝo portreton de d-ro Zamenhof, sur la fono de Esperantlingva teksto pri spiritismo. Interne de la revuo, 11 paĝoj estas entute dediĉitaj al Esperanto-temoj, precipe en ligo kun spiritismo.
Estas kurioze mencii la komencon de unu el la artikoloj: "Zamenhof, sen ia ombro da dubo, estis geniulo kaj, kiel geniulo, mediumo. Kiu volontos studi la vivon de Zamenhof, tiu konstatos, ke tiu vivo estas punktita de faktoj, kiuj elokvente pruvas lian ekstreme senteman psikon, danke kiun la inspira mediumeco ludis ĉe li tre influan rolon por la ellaborado de la internacia lingvo Esperanto".

La artikolo, verkita de Sylvio Brito Soares, aldonas, ke "ni spiritistoj estas konvinkitaj, ke Esperanto estas la rezulto de studoj kaj esploroj efektivigitaj en la Spirita Mondo, de estuloj specialigitaj pri tiu afero."

Pilo-Press, Internacia Informservo ĉiusemajna, jara abono 30,- GM, pagebla al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1, Pĉk. Nürnberg 819 56-851, Stadtsparkasse Nürnberg 1.901.57, Schweizerische Volksbank St. Gallen 629 240, Österreichische Länderbank Bregenz 880.110.899/01

## Legantoj skribas

### Pri la podia diskuto en Ateno

Leginte la lastan numeron (-ro 33) de Pilo-Press, mi kompreneble estas kontenta vidi mencion pri la podia diskuto en la Dua Generala Kunveno en Ateno, kiun mi partoprenis, sed ŝajnas al mi utile, iom precizigi, pri kio temis.

Mi estis sur la podio de tiu kunveno ĉar mi estas tradukisto ĉe la Komisiono de la Eŭropaj Komunumoj - do dungito aŭ funkciulo de la Komunumoj, respektive komunlingve de la Komuna Merkato. Estas do erare kaj miskomprenige paroli pri "reprezentanto de la laboristaro de la komuna merkato", unue ĉar mi ne vere reprezentis sed simple kontribuis laŭ miaj propraj spertoj kaj scioj, kaj due, pli grave, ĉar"laboristaro de la komuna merkato" signifas ĉiujn homojn laborantajn en la naŭ landoj - do inkluzive min, sed pli precize mi apartenas al la "funkciularo de la komuna merkato". Estus eble interese aŭdi la opiniojn de reprezentanto de la laboristaro, sed temis en tiu diskuto specife pri la lingvaj problemoj de ŝtataj aŭ interŝtataj organizaĵoj.

Ĉi-okaze mi ŝatus ripeti tion, kion mi ĉefe diris en Ateno, nome ke la lingvaj situacio kaj problemo ĉe la instancoj de la Eŭropaj Komunumoj estas iusence unikaj, ĉar la Komunumoj reprezentas unikan formon de kunlaboro; gravas ne tiom la pliakriĝo de la situacio, kiom la simbola kaj politika rolo de lingvoj en la Komunumoj, kiu povas konduki eventuale pligrandiĝontajn Komumojn en lingvan senelirejon.

Brian Moon, Howald, Luksemburgo

***********************

### Itala Komunista Partio kaj Esperanto

Koncerne la taksadon pri la valoro de Esperanto farita de itala komunista deputito Tedeschi (Pilo-Press N-ro 27/76) mi esperas, ke Pilo-Press publikigos ankaŭ la ĝustan respondon flanke de italaj esperantistoj, kiu sendube okazis aŭ okazos.

Amaso da esperantistoj estas surprizitaj, ke itala komunisto sin bazas sur la opinio de ŝovinisto Stalin, anstataŭ de internaciisto Lenin, kiu ja diris: "Esperanto estas la lingvo de proletaro."

Pola Leganto

### Respondo de Pilo-Press

Cetere, siatempe deputito Tedeschi, kiu parolis nome de la tuta itala komunista partio, esprimis sin kritike ankaŭ pri aferoj pli ĝeneralaj, ekzemple pri la taŭgeco de la soveta lerneja sistemo, kaj ĝenerale pri la strukturo de la lernejo en socialismaj landoj. La temo estis tuŝita, ĉar la esperantista delegacio emfazis, ke ĝuste en kelkaj el tiuj landoj, precipe Pollando, Hungario kaj Bulgario, Esperanto ĝuas pli formalan pozicion en la lernejoj.

Aldone mi citas el la nunjara raporto de la Itala Esperanto-Federacio pri la konata leĝopropono: "La itala politika situacio ne ebligis fruktodonan daŭrigon de la kontaktoj kun parlamentanoj, samkiel ne estis eble atingi la pridiskuton de la lerneja leĝpropono."

+++++++++++++++++++

### Pri Esperanto-kongreso

Konstatas oni dum kongreso:
Domaĝe mankas la progreso!
Kongreson tamen gaje festas
Kaj lasas ĉion kiel estas.

Hermann Weiß